

TEA-BULTENO

8^A JARO

JANUARO-FEBRUARO 2005

NUMEROJ 1-2



Kara legantaro! Fulmrapide mi trafolumis la pasintjarajn bultenojn, legante nur unuapaĝe la novjaran saluton kutime de mi skribitan. Pro kio? Memkompreneble por eviti ripeti jam diritajn vortojn! Kvakam verdire tiuj vortoj ĉiam fontis el profundaj pripensado, kritikado kaj pritaksado de okazaĵoj de ĵus finiĝinta jaro, ĉijare mi preferas tion eviti, ĉar envere ŝajnas al mi ke nenion specialan aŭ novan mi povus transdoni al vi. Tial fine mi ŝparas al vi tedan esprimadon de sentoj, eble tute malaj al la viaj. Plie la ĉi monata Bulteno jam plenis je pluraj interesajoj, tiel ke tute mankis loko por la kutima enkonduko.

Nu, anstataŭe, mi prezentas al vi etan, kuriozan bildon pri Triesto, verkitan kaj esperantigitan de **3ESTULO**, kiu iĝos konstanta rubriko de TEA-Bulteno, espereble inda je via bonvola atento. Bonan legadon kaj precipe

Bonan Novan Jaron al vi ĉiuj!

Via TEA-BULTEN-redaktanto Elda

Triesto kaŝita

Triesto estas stranga urbo: nobla damo kaj petola knabino, malnova je centoj da jaroj kaj samtempe juneca. Ĉio ajn ĉi tie troviĝas.

Depost la proklamo de Triesto kiel "sendogana haveno" en 1717, alvenis homoj el la tuta Mediteranea baseno, riĉaj kaj malriĉaj, ĉiu kun propraj historio kaj fortuno, por trovi ĉi tie la konstrueblon de sia "estonteco".

Per tio klariĝas la kunestado en Triesto de tiom da malsamaj stiloj kaj vivmanieroj, de konstruaĵoj kaj metioj, kiujn plejofte nia hastemo malebligas al ni rigardi kaj percepti.

Do, ni kuniru malkovri la kaŝitajn angulojn de nia bela kaj amata urbo.

LA PLEJ MALLARĜA DOMO EN TRIESTO

Laŭlonge la straton *Enrico Toti* [enriko t.], en la alta parto ĉe kunfluo kun strato *del Bosco* [de l' arbaro] staras stranga konstruaĵo, tute nekutime ege mallarĝa. Ĝi estas normala loĝejo preskaŭ centjaraĝa, nek fama nek historia, sed probable ununura pro sia ekstravaganca stilo: temas pri la domo ... plej mallarĝa en la tuta urbo!

Kurioza detalo: ĝis antaŭ kelkaj jaroj, en la plej malvasta parto, malgraŭ la liliputaj dimensioj, gastis ŝuriparejo. Tiu malgranda ejo lokiĝis stratnivele kaj havis ian specon de miniature eta subplafonaĵo (fakte la dormoĉambro de la ŝuisto) alirebla per movebla ŝtupetaro. Ĝi tiom malvastis, ke la kompatindulo estis devigata ĉiufoje, kiam li deziris enlitiĝi, forŝovi sian ŝuistan tableton.

Alia strangaĵo: manka je servolokoj, ĉiuj ŝuoj – ripar-

itaj aŭ riparotaj – estis pendigitaj per ŝnuretoj ĉe la vandoj aŭ plafone.

Nia homo tamen, restinta anonimulo, daŭre kondukis kiel "serioza entreprenisto": samkiel ĉiuj aliaj ŝufaristoj, ĉiulunde li fermis sian riparejon, laŭ la leĝaj reguloj.

3ESTULO

Esperanto ĉe Radio




Dum la tuta jaro aŭdiĝis pri esperanto kadre de la alirprogramoj de Regiona Radio—RAI UNO— kaj en la itala kaj en la slovena lingvoj, danke al iniciatemo de Edvige kaj al kunlaborado de Devana Pizziga,

kiu, krom direktori la faman triestan ĥoruson VERDAJ ANĜELOJ, lerte kaj sperte zorgas pri la tradukado de koncernaj, elsendotaj tekstoj slovenen. Kaj tio ĉi daŭros ankaŭ en nuna jaro. Do, jen la rendevuaj datoj en januaro kaj februaro kaj ... bonan aŭskultadon!

Dato	Temo	Lingvo/horo
04.01	Internacia kominikado kaj defendo de la gepatra lingvo	slovene/12.45
07.01	Unesko kaj Esperanto	itale/14.40
11.01	Unesko kaj Esperanto	slovene/12.45
18.01	Triesta Esperanto-Asocio: preskaŭ centjara aktivado	itale/14.40
25.02	Triesta Esperanto-Asocio: preskaŭ centjara aktivado	slovene/12.45

OSIEK-PREMIO 2004



En 2003 OSIEK-anoj proponis 27 verkaĵojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la julia numero de LA GAZETO. La 23^{an} de julio 2004, dum IEK en Pécs, Hungario, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Ed BORMSBOOM

pro

VIVO DE ANDREO CSEH

La premio, 500 €, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkaĵo ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.

Informis: LA GAZETO, FR-55210 Creuë—Francio
<http://osiek.org>

Por kolektantoj de Esperanto-poŝtmarkoj

Aperis nova TTT-ejo pri Esperanto-poŝtmarkoj. Se vi deziras vidi tiujn bildojn, aĉeti aŭ interŝanĝi ilin, vizitu tiun novan TTT-ejon: <http://dauphin.guy.free.fr>

Januara Programo	
04 - mardo	20.00 - Senprograma kunestado
06- dimanĉo	11.00 - Esperantlingva Di-Servo ĉe preĝejo BEATA VERGINE DELLE GRAZIE - Via Giustinelli. La dolĉvoĉa orgeno de Julius Kughy akompanos la koruson VERDAJ ANĜELOJ.
07 - vendredo	20.00 - El nia gazetaro
11 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
14 - vendredo	20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
16 - dimanĉo	10.30 - Jara Asembleo en TEA
18 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
21 - vendredo	20.00 - Krucvortumado
25 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
28 - vendredo	20.00 - Trafoliumante PIV-on!
Febbruara Programo	
01 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
04 - vendredo	20.00 - Tradukada vespero (It↔E-en)
08 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
11 - vendredo	20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
15 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
18 - vendredo	20.00 - Diapozitivaj por revadoj
22 - mardo	20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
25 - vendredo	20.00 - SIA—AŬKCIO
Ĉiumarde, ekde la 18^a h, progresiga kurso Ĉiumerkrede, ekde la 18^ah, baza kurso de Esperanto Ĉiujauĉe, ekde la 18h30, Koruso VERDAJ ANĜELOJ	

37^a Ŝemajno de Internacia Amikeco 21-27 februaro 2005 en Triesto

“Ni ekbruligas la flamon de Amikeco trans limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj. Por ke tiu flamo povu lumi pli klare en la mondo, ni ŝatas labori por la disvastigo de la neŭtrala internacia lingvo, Esperanto. En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floradu kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj”.

Tiel Erik Carlson antaŭ 37 jaroj anoncis la belan ideon pri la starigo de tiu ĉi jara evento kiu poste fariĝis tutmonda tradicio de la Esperanto-medio. Ĝi estis kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de la Internacia Lingvo kaj ĝi aparte taŭgas por aranĝi komunan eventon kun u-nuopuloj kaj membroj de societoj aŭ kluboj.

Kaj ankaŭ ni en Trieste kontribuos al la disvastigado de tiu ĉi granda idealo, kiu substrekas la gravecon de interpopola paca kunvivado kaj interŝanĝado de kulturoj, en plena respekto de ĉies kutimoj, moroj kaj identecoj.

Do, io estos aranĝita de Triesta E-Asocio kaj ĉiuj estos ĝustatempe informitaj pri “kio, kie kaj kiam”. Estas tre bonvenaj ankaŭ viaj priaj proponoj, sugestoj ks.

Esperanto en Eŭrop-Unio

Jen agado kiu vere meritas ĉiajn viajn apogon kaj subtenon. Atente bonvolu legi la suban raporton de la respondeculoj pri Brusela Komunikad-Centro kaj Eŭropa Esperanto-Unio.

Estimataj gesinjoroj, karaj klubanoj kaj eŭropaj esperantistoj, ni skribas al vi por raporti pri la agado, kiun nia Brusela Komunikadcentro kun la helpo de multaj aktivuloj en tuta Eŭropo faris dum la pasinta tempo kaj kion ĝi planas por la estonto.

La fokuso en 2004 estis sur **informa kaj lingvopolitika** agado.

Informado:

- ni informis pri la aperigo de esperanto-rilataj artikoloj en amaskomunikiloj instigante volontulojn klare reagi. Dank’ al la agado de la listo REAGO kaj la kolekto ĉe <http://lingvo.org/gazetaro> kun artikoloj publikigataj pri Esperanto kaj la lingva problemo, ekestis pli pozitivaj sed ankaŭ pli realisma sento, ke Esperanto-asocioj povas influi politikistojn kaj ĵurnalistojn kadre de bona kunlaboro.
- ni mem verkis lingvorilatajn artikolojn en gazetaro kaj tiel surtabligis ankaŭ Esperanton en netruda maniero.
- ni kunlaboris en gazetara agado por la Universalaj Kongresoj (dum 2003 kaj 2004 estis centoj da artikoloj en dekoj da landoj). Ankaŭ estis radio- kaj aliaj elsendoj.
- la japana mecenato, Etsuo Miyoshi, decidis financi gazetaran anonckampanjon por antaŭenigi Esperanton kaj lingvan samrajtecon en Eŭropo. La kampanjo daŭros ankaŭ en 2005.

Lingvopolitiko:

- en aprilo 2004 Eŭropa Parlamento (EP) voĉdonis la unuan fojon pri ebla rolo por Esperanto en EU. Nur eta plimulto kontraŭis, kaj ĉirkaŭ 43% subtenis. Estis intertempe dekoj da parlamentaj demandoj pri lingva diskriminacio, instigitaj de EEU. Intertempe elektiĝis la unua EP-ano, kiu parolas Esperanton, la polino Margareta Handzlik.
- ni organizis kampanjon kaj agadojn de Esperanto-asocioj: premagado ĉirkaŭ la EP-raporto Dell’Alba (aprilo 2004), kunordigo kaj informado de informagantoj de ĉiuj landaj asocioj de UEA, agado okaze de la Tago de Gepatra Lingvo, Eŭropa Tago de Lingvoj.
- ni sekvis diversajn lingvajn dosierojn, informante kaj traktante kun diversaj registaraj kaj neregistaraj organizoj kaj ankaŭ rekte kun politikistoj tiurilate (ekz. rilate al la lingva diskriminacio, deviga uzado de la angla, ktp).

Celoj por 2005

Ni certe daŭrigos la tre sukcesajn bazajn agadojn de la pasinteco ankaŭ en 2005, kaj nia malavara japana amiko, Etsuo, daŭrigos sian kampanjon por lingva samrajteco en la eŭropaj gazetoj. Lingvopolitike ni volas tamen aldoni 3 punktojn:

- 1) Eŭropa Parlamento starigu interpartian grupon por funde pristudi la nunajn eŭropajn lingvajn problemojn, la diversajn ekzistantajn solvojn kaj la eblecon proponitan per Esperanto por certigi lingvan samrajtecon.

2) La kantado de la EŬROPA HIMNO kiam kunestas eŭropanoj el pluraj EU-landoj. Ni provos proponi Esperanton por plenumi tiun funkcion, por kiu, klare, neniu nacia lingvo taŭgas. Ni aparte petas vian subtenon por tiu agado, kiu plifortigos eŭropan identecon kaj solidarecon, kaj povos esti tre grava paŝo al la tutmondigo de Esperanto.

3) Ni daŭrigos nian agadon por altiri aliancinojn inter la defendantoj de naciaj kaj regionaj lingvoj ĉie en Eŭropo. Tiel ni helpas forigi gravan antaŭjuĝon kiu multe damaĝis Esperanton, ke ĝi estas malamiko de aliaj lingvoj kaj celas anstataŭi ilin. Tia kunlaboro helpas kaj Esperanton kaj la lingvan diversecon.

Resume ni aktive kontraŭbatalas lingvan diskriminacion en Eŭropo kaj havas taŭgan ilon por superi diskriminacion kaj certigi lingvan samrajtecon: Esperanton.

Eŭropa Esperanto-Unio, sed ankaŭ la tuta esperantistaro, bezonas profesian stabon en Bruselo, kie okazas la ĉefaj kontaktoj kun la politika mondo kaj internaciaj organizoj. Ne esti reprezentata tie kun profesiaj fortoj estus granda peko de la tuta Esperanto-movado. Sed profesieco postulas monon: mi certas, ke multaj konscias pri la graveco de nia laboro en Bruselo kaj volonte subtenas ĝin finance ĉu individue, ĉu kiel klubo. Ekde minimuma mondonaco de 25,00 eŭroj, vi ricevas senpage la revuon LA ONDO DE ESPERANTO kun speciala suplemento LA EŬROPA BULTENO, kiu estas la oficiala bulteno de EEU. Se vi interesigaĝas finance subteni nian agadon, bonvolu ne heziti rekontakti nin aŭ uzi la kontoligojn, sube indikitaj.

Ni dankas vin pro via daŭra intereso pri nia agado.

Sameŭropece viaj

D-ro Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa E-Unio

Dafydd ap Fergus, direktoro de Brusela Komunikadcentro

D-ro Renato Corsetti, prezidanto de UEA

Kontoj: Bonvolu mencii nian konton "por eece-p, Komunikadcentro"; tra Postbank Köln: Kto 3182 91 509, BLZ 370 100 50 de Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam; tra bankkonto de Flandra Esperanto-Ligo, IBAN BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank, B-1100 Brusel.

Eŭropa Esperanto-Unio/ Brusela Komunikadcentro

Rue Royale St.Marie 7 Koninklijke Sint-Mariastraat
BE-1030 Brusel, Belgio

Tel.: 00-32-(0)484-924.013

komunikadcentro@esperanto.org; <http://lingvo.org>

Mallonge pri... Sekve de iniciato de s-ino

Penny Vos, en novembro 2004 kreiĝis agadgrupo por enkonduki Esperanton ĉe la neregistara organizaĵo PACŜIPO. La ŝipo vojaĝas ĉirkaŭ la tero 2-3-foje jare kun la celo helpi lokajn aktivulojn en la agado porpaca kaj disvastigi sciendaĵojn pri nuntempaj problemoj sociaj, homaj, naturmediaj. Surŝipe konferencoj, prelegoj kaj lingvistodoj pretigas la vojaĝantojn al la havenaj renkontoj. Nia laborgrupo sukcese progresas en la rilatoj kun la respondeculoj de la PACŜIPO.

Bezonatas agemuloj en la havenoj vizitotaj. Pliaj informoj ĉe: <http://www.kontakto.info/pacshipo.html>

Informis ĉe STEFANO.pacshipo@kontakto.info

10 dĉeĉmbro 1948—10 dĉeĉmbro 1954

La 9^{ma} de decembro 2004 okazis en Triesto serio de prelegoj, organizita de CENTRO UNESCO DI TRIESTE kunlaboro kun TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO ĉe la Salono "E. Razole" de la Tria-Aĝa Universitato. La temaro koncernis la Universalan Deklaracion pri Homrajtoj, proklamitan la 10^{ma} de decembro 1948 ĉe la Ĝenerala Asembleo de UNO. En ties kuntekston tre taŭge eniris la jubilea memorigo de alia tre grava evento, kiu forte influis la postan agadon de la tutmonda Esperanto-movado, nome la unua rezolucio favore al la internacia lingvo, aprobita dum la 8^a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, en la 1954^a jaro. Tio ĉi estis tre brile kaj atentokapte prezentita de Edvige Ackermann kaj la nombra ĉeestantaro, plejparte ne-esperantista, havis la eblon konatiĝi kaj kun nia lingvo kaj kun ties, tiutempa, historia momento. Okaze de tiu ĉi celebrado, TEA eldonis 28-paĝan, itallingvan, broŝuron, enhavantan 4 prelegojn: "La Internacia lingvo Esperanto kaj UNESKO" (E. Ackermann), "Internacia Amikeco, UNESKO kaj kunlaborado inter diverskulturaj popoloj, integriĝo kaj plilarĝigo de Eŭropa Unio" (L. Milazzi), "Internacia Tago de la Gepatra Lingvo", "Esperanto defende de la gepatra lingvo kaj kultura diverseco" (E. Ackermann).

Sed ĉu ni esperantistoj ja bone konas la tutan streĉan laboradon, kiu antaŭis kaj dumis tiun eksterordinaran kaj signifoplenan okazaĵon? Mi profitas de la apero de ĉi suba artikolo, dissendita rete de Retinfo, www.eventoj.hu, por plenigi eventualan truon en konoj kaj scioj pri la Esperanto-evoluo kaj progresado.

Artikolo el la revuo ESPERANTO, februaro 1988, represita en Eventoj n-ro 068, decembro 1994

La venko de Montevideo

Ĝuste antaŭ 40 jaroj (en 2004: 50 jaroj!!!) okazis historie grava evento por esperantistoj: la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo akceptis la unuan rezolucion pri Esperanto, rekonante ties valorojn. En Zamenhofa festo rememoru ankaŭ pri tiu ĉi sukceso.

Estis la rolo de Ivo Lapenna en akceptigo de la unua UNESKO-rezolucio favora al Esperanto en 1954, kiu plej famigis lin tra la movado. La jam konata oratoro kaj movada gvidanto ekestis figuro de mitaj proporcioj. Kaj ne senmerite: ĉar tiu unua oficiala rekono de Esperanto en la postmilita mondo estis sendube la plej malfacila, kaj ankaŭ - ĉar la unua - la plej valora tia paŝo en la movada historio.

Ĉar hodiaŭ malmultaj konas la detalojn de tiu triumfo, ni ĉi tie prezentas resuman rakonton surbaze de la raporto en ESPERANTO, februaro 1955.

La grundon oni komencis prepari jam en 1950, kiam reprezentantoj de UEA transdonis al Unuiĝintaj Nacioj "Petskribon pri Esperanto", subskribitan de 492 internaciaj organizaĵoj kaj preskaŭ 900 mil individuoj. En la sekvaj Ĝenerala Konferenco de UNESKO (Parizo, 1952), zorgaj antaŭpreparoj de Lapenna, Privat, Durrant kaj aliaj sukcesis akceptigi rezolucion (de la svisa delegacio) por diskonigo de la Petskribo kaj decido pri ĝi kadre de la venonta Ĝenerala Konferenco en Urugvajio (Montevideo, 1954).

Dum 1953 Lapenna, sub la ŝildo de CED (Centro pri

Esploro kaj Dokumentado), kunordigis internacian informkampanjon celitan al naciaj UNESKO-instancoj kaj intelektulaj medioj. Samtempe UEA komencis kolekti monon por sendi reprezentanton al Montevideo, kaj fine de 1953 ekkompilis materialon por samokaza Universala Ekspozicio. Dum 1954 la esperantistoj klopodis konvinki iun nacian delegacion al propono de konkreta rezolucio ĉe la Konferenco, sed sensukcese. Fakte la UNESKO-raporto pri la Petskribo, kiu aperis en junio, estis sufiĉe malesperiga: nur dek landoj reagis pozitive, dum dek naŭ esprimis sin kontraŭ la favora sekvo al ĝi.

Tiel statis la aferoj, kiam Lapenna aperis en Montevideo la 1^{an} de novembro 1954. La tuton de tiu monato li pasigis en preparlaboroj, kontaktante pli ol 300 delegitojn kaj mastrante la pretigon de la Ekspozicio. (Ĉi lasta montriĝis ŝlosila en la varbado de apogantoj, kaj oni devas admiri la klarvidon, kiu antaŭpretigis ĝin.) Finfine la 2^{an} de decembro li sukcesis konvinki la meksikian delegacion proponi rezolucion pri Esperanto: la saman vesperon ĉirkaŭ 30 aliaj delegacioj promesis subteni ĝin. Du tagojn poste la Programkomisiono, kiu unua devis decidi pri reago al la Petskribo (kaj de du tagoj prokrastis ĝian pritrakton), alvenis al tiu tagorda punkto.

Estis tiam, post prezento de la meksikia rezolucio, ke okazis la fifama interveno de la dana lingvisto Blinkenberg, kiu uzis sian paroladon por ridindigi Esperanton per aro de lerte kunplektitaj mensogoj. Lapenna ricevis nur 3 minutojn por paroli entute, kio post tia malicaĵo kompreneble montriĝis nesufiĉa: per 23 voĉoj kontraŭ 3 kun 19 sindetenoj la komisiono rifuzis la rezolucion. Lapenna sukcesis atingi nur, ke ĝi tamen akceptis la Raporton faritan de la Sekretario en junio, tiel certigante, ke Esperanto estos remenciita en la ferma Plenkunsido post unu semajno.

Tamen la ludo ŝajnis finita, ĉar ekzistis nenia proceduro per kiu reenmeti la rezolucion. Sed Lapenna rifuzis cedi. La saman vesperon li kaj membroj de la Urugvaja Esperanto-Societo kunmetis protestleteron, kiun ili dissendis en la hispana al deko da gazetoj; la morgaŭan matenon ili resendis al la Dana Konsulejo ties kulturfilmon en Esperanto. Kaj, mirakle, la afero kaptis la intereson de la urugvajaj ĵurnaloj. (Interalie Blinkenberg faris la eraron diri - kun implica insulto - ke Esperanto taŭgas nur por la urugvajaj menuoj.) Ene de tri tagoj, la rifuzo en la Programkomisiono fariĝis unu el la plej diskutataj temoj en Montevideo.

Tiun atenton Lapenna brile eluzis. Post intervjuo ĉe radio kaj ĵurnaloj, li formulis tre ekvilibran leteron al la konferenca prezidanto, kiu matene de la 9^a estis dissendita al ĉiuj delegacioj. La reeĥoj estis tiel pozitivaj, ke li samtage petis permeson paroli en la fermkunsido kiam la Petskribo remenciigis. Tion rifuzis la konferencaj gvidantoj: sed persona interparolo kun Lapenna, dum lasta horo antaŭ la komenco de la Pleno, persvadis ilin resubmeti la meksikian rezolucion al ĝenerala voĉdono (sen iu kontraŭata punkto 4) kiam leviĝos la akcepto de la Petskribo).

La inundo de gazetaraj artikoloj kaj radioelsendoj en la antaŭaj tagoj pruviĝis decidiga. Preskaŭ sen diskuto kaj sen kontraŭstaro, la rezolucio akceptiĝis en la Plenkunsido per 30 kontraŭ 5 voĉoj kaj 17 sindetenoj; kaj

inundo de aplaŭdoj kaj gratuloj, eĥota poste en Esperanto-gazetoj ĉirkaŭ la mondo, salutis la "heroon de Montevideo", en kies kariero - plena de triumfoj - verŝajne nenio povis superi la ekzaltan de tiu momento. Eble nun, post 40 jaroj, kiam la kunlaboro kun UNESKO jam rutinigis kaj intertempe venis pliaj rezolucioj, tiu atingo ne plu ŝajnas tiel granda; sed en tiu tempo kaj kunteksto, ĝi estis tertremo.

Montevideo 1954

Lapenna venkis ĉe Unesko.
Per strategi' kaj streĉo nerva:
El la lastvica seĝ' observa
Grandiĝis kun mirakla kresko.

★ ★ ★

Ĝis alto de l' plafona fresko.
Jes, la nerezisteble verva
Lapenna venkis ĉe Unesko
Per strategi' kaj streĉo nerva.

★ ★ ★

Kia ŝakmajstra fosforesko
De cerbo ĉiam brile serva!
Indigna, sed trankvilkonserva
Pri l' aĉa Blinkenberg-burlesko,
Lapenna venkis ĉe Unesko.

Ralman Kalocsay



Esperanto en Aziaj Universitatoj!

Esperanto akceptita de Korea

Fremdlingva Universitato! La 15^{an} de novembro 2004, Korea Fremdlingva Universitato, la plej fama lingvo-universitato en Koreio, oficiale akceptis Esperanton kiel lerno-objekton de nova semestro, kiu estos instruota ekde marto 2005^a. La universitato havas du lernejojn en Seulo kaj Yongin. En ĉi universitata kampo temas jam pri la tria sukceso en Koreio, post Universitatoj de Dankook kaj Wonkwang. La nuna prezidanto de KEA, D-ro LEE Young-koo, estas profesoro pri ĉinlingva fako ĉe Korea Fremdlingva Universitato. Bonvenas gratulmesaĝoj el la tuta mondo al retadreso de Prof. LEE: ykli@hufs.ac.kr

Universitato en la urbo Dalian, Liaoning-provinco, Ĉinio, atingis la pinton de Esperanto-instruado. En tiu universitato, seninterrompe, oni lernas la internacian lingvon ekde antaŭ 22 jaroj. Ĉijare ĝi atingis pli altan ŝtupon: de nedeviga ĝis komuna, nedeviga studobjekto kun akireblo de 2 studpoentoj. En la unua duonjaro 2004/2005 jam 109 studentoj el 14 institutoj de la universitato anoncis sin kaj serioze eklernis en la Esperanto-kurso, gvidata de Prof. Wang Tailin. Unuafoje en la historio de la kursoj, ke tiel multnombri la lernantoj kaj fakoj. Grava atingo de ĉina Esperanto-movado!

Informis Wu Guojiang Rete: amikeco999@yahoo.com.cn

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tele2.it

<http://arte.triesteincontra.it/esperanto>

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 16^{an} de januaro 2005 je la 10.30 en unua kunvoko kaj respektive je la 11.00 en dua kunvoko.** Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2004:

- a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
- b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
- c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Giuseppe Valle*)
- ĉ) Raporto pri la libro-fako (*Giuseppe Valle*)
- d) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Elio Nocent*)
- e) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)

4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 16^{an} de januaro 2005.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone! Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI-kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn de LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj).